




Enhavtabelo	Paĝoj	Kulturo ĉirkaŭ relo : libro
En sia ĉi apuda libro Stéphanie Sauget, profesorino pri nuntempa historio en la universitato de Tours, priskribas la faman akcidenton, kiu okazis en 1895 en la Montparnasse stacidomo, sed ne nur. Ŝi ankaŭ interesiĝas al la historio kaj la disvolviĝo de tiu pariza kvartalo.	1 kaj 2	Historio : 24 horoj en la vivo de la Montparnasse stacidomo. <i>En la verko « Dudek kvar horoj en la vivo de stacidomo », Stéphanie Sauget revenas al fervoja akcidento simbolita per bildo restinta en la memoroj: en oktobro 1895, la lokomotivo de la eksprestrajno el Granville trarompas la vitrosepton de la Montparnasse stacidomo por kraŝi malsupren. La historiistino rakontas tiun tragikan rakonton, enprofundigante nin en la vivon de pariza stacidomo fine de la 19a jarcento.</i>
La pli multo da homoj pensas, ke ardeoj nutras sin ekskluzive per fiŝoj ; fakte ili eraras. Legu tiun artikolon kaj vi estos surprizita de la predo, kiun tiu ardeo provas gluti.	3 kaj 4	La 22an de oktobro 1895, la eksprestrajno el Granville ne sukcesas bremsi kaj eksplodigas la vitrosepton de la Montparnasse stacidomo. La lokomotivo finis sian kurson sur la placo de Rennes. La bilanco estas mirige « leĝera ». Oni priploras « nur unu » rektan viktimon : la edzinon de gazetarvendisto, kiun ŝi antaŭis portempe. Instalata sur la placo de Rennes, tiu ĉi vendis la gazetojn al la trampasaĝeroj.
Ĉu endas riveli al amiko, ke lia kunvivantino malfidelas al li ? Se vi respondas tiun demandon per jes, eble la legado de la novelo "Absurda akcidento" ŝanĝos vian opinion.	4, 5, 6, 7 kaj 8	Jam la morgaŭon la evento aperas sur la frontpaĝo de pluraj gravaj ĵurnaloj kaj desegnaĵo de lokomotivo eskapanta el la stacidomo estas publikigita. <i>Le matin</i> , <i>Le petit Journal</i> aŭ ankoraŭ <i>Le Petit Parisien</i> detale raportas pri la evento por siaj milionoj da kumulitaj legantoj. Poste la vesperaj kaj regionaj ĵurnaloj ankaŭ multe raportas pri la fervoja akcidento. Centoj da artikoloj aperas. Kelkajn monatojn poste, la fremda gazetaro rakontas la eventon.
Jen nova recepto, kiu estas proponata al ni de Jeannine.	8	Tio estas hodiaŭ fervoja bildo konata en la tuta mondo : « Fakte, la bildoj, kiuj alvenis el la akcidento

ĝis ni fariĝis ikonaj kaj mondaj aŭ mallokalaj, nome en sia pli granda nombro malkonektitaj de siaj ligoj kun Francio, kun Parizo kaj kun la Montparnasse stacidomo. Laŭ artikolo de Jason Zasky aperinta en la retmagazino *Failuremag.com* en 2014, la fotgrafio de la akcidento, kiu plej ĉirklis, almenaŭ fine de la 20a jarcento, kiam ĝi malprivatiĝis, devenas de la *Lévy et fils* fotostudios. » Tiun embleman bildon oni uzis por illustri verkon de usona profesoro pri fiziko aŭ la saketon de albumo de la rokmuzika grupo Mr Big. Sufiĉas iom retumi por vidi la faman lokomotivon finalvenintan sur t-ĉemizoj, tasoj aŭ mustapiŝoj.

La historiistino Stéphanie Sauget, profesorino pri nuntempa historio ĉe la Tours Universitato, specialistino pri la fervoja historio kaj sociaj spacoj, precipe parizaj stacidomoj, kaptis tiun eventon por pentri la portreton de la Montparnasse stacidomo antaŭ, dum kaj post la katastrofo. Per tiu eventostudo ŝi deziras klarigi kio estas nuntempa spaca imagaĵo. La aktuala Montparnasse stacidomo estas la sola pariza stacidomo, kiu konservis neniun elementon de sia historio. Kvankam nenio rememorigas en la nuna la hieraŭan stacidomon – la nova stacidomo staras sur la loko de la stacidomo de la Maine, kelkajn centojn da metroj malantaŭ la Montparnasse bulvardo – la akcidento de la 22a de oktobro 1895 senmortigis en la kolektiva imagaĵo la malaperintan stacidomon. Almenaŭ ties tratanĉitan fasadon. Stéphanie Sauget kondukas la leganton transen kaj montras al li la realon de la stacidomo kaj ĝia tuta komplekseco.

De la « *enŝipejo de la baraĵo de la Maine* » kiu akceptas la unuajn vojaĝantojn de la kompanio al okcidento ekde septembro 1840 ĝis la stacidomo, kiun oni konas hodiaŭ, la konstruo kaj la evoluo de la Montparnasse stacidomo ankaŭ rakontas la historion de la baraĵon de la Maine, de la komunumo Vaugirard, de la kvartalo Plaisance. Ĝis 1860 la pejzaĝo estas kampara. Transirante la muron de la Impostistoj, la Parizanoj venas malnobliĝi en la danctrinkejojn kaj trinki malbonan vinon en bona kompanio. Iom post iom Parizo pligrandiĝas, la stacidomon atingas la urbo. La kvartalo komplete transformiĝas kaj ŝanĝas sian vizaĝon, tiam la ĉefurbo konstante moderniĝas. La perspektivo pri la Universala Ekspozicio de 1900 transformas la urbon kaj ties stacidomojn. En tiu kunteksto okazas la akcidento.



Dank al la multaj enketoj diligente kondukitaj por kompreni kaj atribui la respondecojn, la historiistino povis precize priskribi la faktosinsekvon de la katastrofo. La leganto tiel malkovras la kulisojn de la stacidomo, ties organizon, la virojn kaj virinojn, kiuj laboras tie. La tagon de la katastrofo detalege rakontas la aŭtoro per la multaj atestoj de viktimoj, vojaĝantoj kaj pasantoj, sed ankaŭ de fervojistoj ĉeestantaj tiutage.

Se la kompanio al la okcidento redaŭrigas la ekspluatadon jam la morgaŭon, restas ankoraŭ multo farenda por forigi la cikatrojn de la evento. Pluraj jaroj necesos, por ke postrestos plu nenia spuro. En 1899 la fama ĵurnalistino Thomas Grimm el *Le Petit Journal* (La Malgranda ĵurnalo) skribas :« *En la Montparnasse stacidomo la trajnoj alvenas fakte ĉe la alteco, pri kiu oni bonvolas pensi por unua etaĝo, sed kiu estus beleta dua por domo burĝe loĝata. Tiu situo tiel escepta kiel alta ne estas ordinara, kaj oni memoras, ke antaŭ kvar jaroj lokomotivo je leĝeraj moroj profitis de tio por ĵeti sin tra la fenestro kiel simpla malpruda modistino, kiu sin memmortigas. Tiu evento ne plu okazos, ĉar la Montparnasse stacidomo subiĝas tiumomente al tiaj modifoj, ke lokomotivoj je sendependa menso ne plu povos riski la aferon ?* »

La historiistino fine interesiĝas pri la longa eĥo, kiun tiu fervoja evento lasis postsoni dum la monatoj, jaroj, jardekoj, kiuj sekvis. Ŝi ankaŭ pravas la plenan potencon de tiu bildo. Ĝi estos duplikita sur poŝtkartoj, estos temo por multaj ŝercoj de la tiamaj humoristoj, inspiros eĉ arkitektojn kaj filmistojn kiel Martin Scorsese, kiu en 1991 montras okulfrapan reproduktaĵon en sia filmo *Hugo Cabret*.

Tiun recenzon de Samuel DELZIANI aperintan en la revuo « *La vie du Rail* » de la 13a de oktobro 2023 » esperantigis Jean-Mary.

Vingt-quatre heures de la vie d'une gare, de Stéphanie Sauget. Editions Nuvis. Prix : 14 euros. (2023)

Kiam la ardeo preparas sin por manĝi

Tiun printempon mi iris al Chilly-Mazarin (Essonne, Francio), unu el la malplej verdaj komunumoj de la Granda Parizo, ĉirkaŭbarita de la kurejoj de la Orly flughaveno kaj la A6 aŭtovojo. Tie tamen, mi malkovris parkon apudestantan la urbon, kaŝitan trezoreton da verdaĵo.

Biciklante sur la vojoj, mi trafis post iom da tempo fronte al mi ardeon laŭ la rivero Yvette. Ĝi estis sur la kontraŭa bordo kaj tenis strangan predon en sia beko.

Komence mi kredis, ke estis rato, ĉar la ardeoj, vi scias, manĝas ne nur fiŝojn ; ili voras ankaŭ ranojn, salamandrojn, krustacojn, insektojn, kolubron, anasidojn, rongulojn kaj sovaĝajn anseridojn, eĉ kuniklidojn. Kiam mi surmetis miajn binoklojn sur miaj okuloj, mi vidis, ke mia ardeo kaptis talpon. Sed kiel ? Ĉu la malfeliĉulino momente ekmontris eksteren sian muzelon ? Ĉu la ardeo aŭdis ĝin fosante ĝuste sub la surfaco antaŭ ol harpuni ĝin per sia longa pinta beko ? Fakte la timinda stilzobirdo ŝajnis ne scii kion fari de tiu talpo ? Ĝi tenis ĝin per la ekstremoj de siaj mandibloj, kiel oni tenus unu « nem » inter du bastonetoj, senmova, la rigardo al nenio, sajnante cerbumi pri solvo. Kiel gluti sian manĝaĵon ?

La talpoj estas pezaĵoj, aĵo kun mezuro de andujeto AAAAA, kun korpo cilindra, kovrita de dika felo, nigra kaj brila, kaj kruoj kun akraj ungegoj. Tutkontraŭo de angilo aŭ de orfiŝo glatega, facile englutebla. La ardeo finfine elektis ekflugon. Sed ne malproksime. Ĝi nur laŭiris la rivereton por instaliĝi iomete pli alte, sur strandeto.

Delikata gustumado

La talpo, ĝis tiam inerta, baraktis en lasta strebo por provi malligiĝi el la fera beko de sia predanto. La mamulo, luktanta por sia vivo, furioze tordiĝis, sendanta etajn ondetojn tra sia grasa kaj cilindra korpo. Poste alvenas la mortobato : la ardeo jonglas kun sia predo kaj, en la aero, donas al ĝi tri mortigajn batojn de ponardo, kiuj fendas ĝian korpon. La talpo kuŝas inerta, mole pendanta el la beko de ĝia granda plumfalĉilo.



Frاندema birdo, aŭ simple ne idiota, la ardeo tiam trempas sian predon en la akvon de la Yvette, kiel oni trempus la pinton de korna bulko en sian kafon, sendube por humidigi la felon de sia manĝaĵo. Kaj glutas ĝin skuoplene, sendante ĝin por ĉiam en sian stomakon.

Talpoj estas inĝenieraj specoj. Volboŝlosilo de la ekosistemo, ili estas malestimataj kiel « malutilaj » bestoj, dum sen ili, la grundo ne estus aerumita. Reĝino en la suba regno, el kie eliĝas la monda fekundeco, tiu talpo troviĝis en mondo ankoraŭ pli obskura, pli lontana, kun siaj atomoj grandparte digestitaj kaj integritaj de ardeo, por multaj spektinda, belega, simbolo de gracieco kaj de leĝereco.

David Rosane

Plumpezulo

Malgraŭ sia granda staturo kaj sia enverguro de pli ol unu metro, tiu granda stilzobirdo de humidaj medioj pezas nur inter 1 kaj 2 kg. Ĝiaj kavaj ostoj, karakterizaĝo de la plejmulto de la birdoj, kaŭzas tion. Kiel multaj, ĝia korpo estas ankaŭ trapasita de reto da aersakoj ligitaj al la pulmoj, kiuj pleniĝas dum la spirado. Tio aldonas leĝerecon kaj portancon por flugi.

Timinda ĉasisto

La cindrokolora ardeo ĉasas same en la kampoj kiel en la akvo, same dum la lunnoktoj kiel dum la tago. Ĝi plej ofte senmove fiŝkaptas kaj atendas esti forgesita de siaj predoj, kiujn ĝi kaptas kaj aŭ harpunas poste per mortiga atako de sia beko ponardforma. Ĝia longa kolo iom agas kiel risorto. La ostoj aŭ la fiŝostoj, haroj aŭ skvamoj de ĝiaj predoj estas regurgitaj en formo de kompakta bulo aŭ « volvaĵo de elĵeto », kiel ĉe la strigoj.

Ambranĉeto

La luksega nupta parado ofte okazas sur la loko de la nesto. La virardeo hirtigas siajn dekoraciajn plumojn kaj faras ĉiajn specojn de riverencoj kaj de troigitaj elstreĉiĝoj. La du partneroj reciproke glatigas siajn plumojn. Li donacas al ŝi branĉeton. Ŝi akceptas ĝin (aŭ ne) kaj integras ĝin en la neston. En ardea lingvo tio signifas « jes ».

Ĉampiono de adaptiĝo

La cindrokolora ardeo, birdo relative komuna, ŝuldas sian sukceson grandparte al sia nutrada fleksebleco. Ĝi ne estas frandemulo. Koncerne simbolismon, la Keltoj vidis en tiu birdo je rimarkinda adaptiĝo la simbolon de la transformado kaj de la transcendenco. Paŝpontetaj estaĵoj kapablaj kunligi la regnojn de akvo, grundo kaj ĉielo.

David Rosane, estas aŭtodidakta naturalisto. Li organizas promenojn por komuniki sian pasion al abunda publiko.

Traduko far Jeannine de artikolo de la revuo Le Pèlerin n° 7388, 4an de Julio 2024.

Absurda akcidento

far Jacques Lemoine

Jam la dekkvara.

Francine falsidiĝis sur seĝon kaj suspiris pro malpeziĝo. Ŝi ĵus finis la dompurigadon kaj estis farinta kiel eble plej pura la malnovan cevenan provencan kampodomon. Plian fojon ŝi estis devinta ŝanĝi la littukojn. Ankoraŭ tolaĵon por lavi, preskaŭ ĉiutage.

Nenia gladado. Robo nur de tempo al tempo, kiam ŝi havis la okazon viziti siajn gepatrojn, aŭ por siaj kursoj pri kontotenado. Se ne, ŝi ordigis la tolaĵon en la ŝrankon tia, kia ĝi estas. Per la tukpeco, kiun ŝi estis uzinta por senpolvigi, ŝi deviŝis la ŝviton de la frunto kaj stariĝis por prepari la manĝon : ĉiam la samajn de jaroj, faritajn per la produktoj de la farmobieno : ovoj, kunikloj, kaprinaj fromaĝoj, kokidoj, kapridoj kaj legomoj kaj fruktoj de la ĝardeno, kiun ŝi kultivis.

Kaj iafoje fiŝon, kiun alportis Emilien, fora fiŝista kuzo, interŝanĝe de pelardonoj (provenca fromaĝo). Neniam bovrostaĵo, aŭ simplaj bifestekoj, ĉar tio estis tro multekosta por lia monujo.

Per gesto de incitiĝo ŝi forpelis la grandajn muŝojn, kiuj venis por ĉikani ŝin konstante zumante. Ŝi rigardis supren kaj vidis la glubendojn puŝnajlitajn sub la plafono : ili nigris pro la insektoj, el kiuj kelkaj baraktis en la gluo freneze svingante la kruojn. En la posttagmezo, aŭ prefere morgaŭ matene, ŝi ŝanĝos la rulojn.

Necesis fari tion ĉiun duan tagon.

Ŝi estis ĉion akceptinta, ĉion ! Sed la muŝojn, tute neeble. Ŝi ne plu sukcesis elteni.
Ne kiel Jean-Marc, ŝia edzo, kiu estis fariĝinta vera arbarulo. Kontraŭe li eltenis ĉion.

Tra la fenestro ŝi vidis lin alveni, ĉiam egala al si mem. Maldika, kiel la unuan tagon de ilia renkontiĝo, kun milda vizaĝo, vestita per ĉiama senkulpa rideto, kiu komence ravis ŝin, kiun ŝi nun abomenis. Dika nigra hararaĉo, kiun li foje aranĝis en ponevoston, kaj longa barbo de ortodoksa pastro, kiun li neniam prizorgis, kompletigis la personon. Lia laborkombineo, liaj haroj, lia barbo estis punktitaj per pajleroj kaj liaj botoj kovritaj per sterko.

Li eniris la kuirejon, ne zorgante pri la malpuraj markoj, kiujn li lasis sur la planko. Li infanece ridetis al sia edzino sen kisi ŝin kaj instaliĝis sur sian kutiman sidlokon tia, kia li estis, en botoj, blua laborvesto kaj kun malpuraj manoj. Li prenis la grandan panbulton kaj tranĉis al si pecon el ĝi.

Interŝanĝante kelkajn cirkonstancajn parolojn la paro manĝis la salaton kun kaprina fromaĝo, kiun Francine estis preparinta.

Fine de la manĝo Jean-Marc verŝis al si glason da metiista cidro, farita per pomoj el la fruktoĝardeno, kaj supreniris en ilian dormoĉambron por siesti.

Kiel kutime li kuŝiĝis sur la superkovrilon sen formeti nek la malpurajn botojn nek la pajlokovritan kombineon.

Francine, kiu rezignis pro la forto de la tempo, ne plu ofendiĝis. Ŝi formetis de la tablo la manĝilaron kaj eklavis ĝin.

Kvankam ŝi neniam estis graveda pro tiu plumpulo ne kapabla fari bonkvalitan spermon, « ankaŭ tio ne kontribuis plibonigi nian rilaton, ŝi pensis », ŝi grasiĝis, ŝiaj mamoj plipeziĝis, ŝiaj koksoj plidikiĝis, ŝia ventro rondiĝis.

Kaj ĉar tio ne plaĉis al ŝia viro, kiu senĉese ripetadis « Por fari kion ? Oni neniam eliras ! », ŝi ne plu vestis sin, ne plu ŝminkis sin, nu krom kaŝe, kiam ŝi iris al kursoj sed tio estis ŝia tenera sekreto.

Ankoraŭ pli malbone, Jean-Marc rifuzis, ke ŝi razu la kruojn kaj sub la akseloj.

Li apenaŭ konsentis, ke ŝi duŝas sin, sed ne ĉiutage, por ŝparado.

Li havis tamen strangajn ideojn ! Nu, konsiderante la rilatojn, kiujn ili havis...

Dek jaroj ! Dek jaroj da geedzedco kaj preskaŭ tiom da jaroj pasigitaj en la provenca kampodomo.

La kampodomo ? Tiu ruino perdita meze de nenio, kiun ili aĉetis kontraŭ ridinda sumo ? Kia ridinda senvaloraĵo !

Kiam ili ekposedis ĝin, esis nur la tegmento kaj la muroj. Kaj ĝi esis nur alirebla per mulvojo.

Por la translokiĝo, tenu vin bone, necesis meti pleton sur azenon kaj sur la pleton la fridujon, la kuirfornon, la televidilon, la kanapon, la liton, ĉio ĉi en pluraj tagoj. Ĉu necesas klarigi ?

Komence neniuelekto, nur la elektrogenerilo, kaj por la akvo cisterno. Ni devis adendi pluvon, por ke ĝi pleniĝu, alie necesis iri al la puto kvindek metrojn for.

Ŝi forlasis ĉion.

Siajn jurstudojn, sian familion, siajn amikinojn, siajn elirojn, siajn ridegojn. Ĉion. Ŝi forlasis ĉion por sekvi lin en tion, kio devintus esti edeno. Ŝi plorus pro tio.

Kuraĝe ŝi ekfaris la taskon kiel eble plej bone.

Komence ĉio nova ŝajnas bona !

Ha ! Estis promesoj, multe da ili, kaj se ŝi ricevintus unu frankon ĉiufoje, kiam li faris unu, ŝi nun estus riĉa :

« Kaj mi faros al vi banĉambron, kaj mi konstruos fromaĝlaboratorion, kaj mi fabrikos ĉirkaŭbaritejon por meti porkojn, kaj kaĝojn por kunikloj, kokidoj, ktp...

Kvazaŭ kaproj ne sufiĉus !

Estas vere, ke ĉe la komenco la laboro estis preskaŭ ne superebla. Sed prefere ol celi prioritatojn, Sinjoro Jean-Marc faris ĉion kiel diletanto. La banĉambro matene, duona muro el blankaj kaheloj en la « estonta » laboratorio posttagmeze, tri betonbrikoj por la « estonta » ĉirkaŭbaritejo de la porkoj post la manĝo, estis

tuboj, kiuj elstaris de monatoj en la « estonta kuirejo, kaj ĉio tiel, iele-trapele.
Ĉio tio interrompita de karesoj iner du melkadoj, de teneraj gestoj kaj mildaj kisoj plenaj je komuna ŝvito.
Tio ne daŭris longe !

Li ĉiam havis urĝan kialon dediĉi sin al io alia. Tio finfine iĝis laciga. Tamen ne ĉio devas esti nigrigata !
Per oni ne scias kian sorĉotrukun, li sukcesis igi lokan entreprenon senpage buldozi padon tra la
arbaro. Estis pli bone, ĉar ne plu bezonatis la azeno. Ni povis aliri al la farmdomo per aŭtomobilo, sed pro
la eluziĝo de la tempo, la pado transformiĝis en apenaŭ veturebla vojstreko, plena je sulkoj, truoj, tuberoj,
kaj ankaŭ danĝera ! Precipe la kurba parto, kiu superis la ravinon ; la radoj apenaŭ pasis. Ĉiufoje ŝi timegis
stirante sian Clion.

Kun la tempo la situacio iom pli boniĝis. Oni ne plu bezonis la elektrogenerilon. Estis flua akvo el la
kranoj, loko por lavi sin... jes ! Sed post dek jaroj. Ĉu vi imagas ?

Suspirante ŝi preparis al si kafon kaj iris sidiĝi sur la benkon apud la floranta visterio. Gustumante ĝin per
etaj glutoj, ŝi demandis sin, kiel ili alvenis ĝis tia situacio.

En la fina klaso ŝi vidis la unuan fojon tiun belan junulon brunan, sveltan, kun duonlongaj haroj precize sur
la oreloj. Li jam havis barbon, sed laŭmakzelan barbon kiel la filozofoinstruisto. Kaj krome ĉiam bone
vestita. Plej ofte en moderna, laŭmoda kostumo. Preskaŭ modogravuraĵo, kiun ĵaluzis la junuloj kaj kiu
logis la junulinojn, kiel konfitaĵpoto vespojn.

Se li volintus, ili ĉiuj falus al liaj piedoj.

Sed kiu scias kial ? Al ŝi enamiĝis li.

Kiam li rigardis ŝin enamiĝinte, ŝi estis tute kortuŝita. Se ŝi nur sciintus !

Estas vere, ke ŝi estis beleta tiuepoke. Maldika talio, longa, blonda hararo, kiun enkadrigis ovala vizaĝo,
bluaj okuloj, bela ŝultrolinio kaj lumbokurbo, kiu igis pli ol unu enamiĝi en ŝin.

Ili parolis pri sia vivmedio.

Koncerne lin ? Liaj maljunuloj ? Ambaŭ liberalaj profesioj, luksa vilao, purigistino, granda limuzino. Li
malamis ilin.

Koncerne ŝin ? Ŝia patro ? Ŝtatoficisto en la impostoservo. Ŝia patrino ? Ĉeĥjma virino, kaj la
ĝardendomo je kredito, la malfacilaj monafinoj, la ĉiutaga vivo de mezaj francoj. Ŝi amegis sian familion.
Iom konformisma, li volis, antaŭ ol komenci seriozan rilaton, prezenti ŝin al siaj gepatroj.

En la difinita tago, Francine, por fari honoron, vestis sin per bela ĉielblua robo kun boatforma kolumo kaj
orlo precize super la genuoj, kaj surmetis nigrajn ledajn ŝuojn.

Kaj jen por kroni la tuton ŝi surmetis al si kelkajn senvalorajn juvelojn.

La bonvenigo estis ĝentila sed iom frosta.

Dum la tagmanĝo sub la afabla degna rigardo de sinjoro kaj sinjorino, Francine purpuriĝis kaj plurfoje
konfuziĝis en la uzo de la glasoj kaj manĝilaro.

Fine de la posttagmezo, antaŭ ol iri preni sian buson, la sinjoro milde premis ŝian manon.

-- Estis tre agrable, ke mi konatiĝis kun vi, fraŭlino. Vi estas ĉarma.

La sinjorino etendis al ŝi la sian, aeran, manukuritan.

-- Kaj tiom... natura !

Male, la gepatroj de Francine varme bonvenigis la junulon, kaj li ne devis barakti per la forkoj kaj tranĉiloj
por servi sin ĉe la ĝardena kradrostilo.

Ĵus post la bakalaŭreco la du junuloj je granda konsterniĝo de siaj respektivaj gepatroj iris kampadi
profunde en Larzac.

Tiam ŝanĝiĝis ĉio.

La renkontiĝo inter Jean-Marc kaj grego da kaproj estis decidiga.

Li estis trovinta sian vojon, sian alvokiĝon, unuvorte la sanktan gralon.

Ankaŭ li havus sian brutaron, ankaŭ li farus sian fromaĝon, kaj li kuntrenis sian amantinon en sian deliron.
Je la komenco de la lerneja jaro, malgraŭ familia vetoo kaj severa minaco depreni la vivrimedojn, li
enskribiĝis spite ĉiujn barojn en lernejo pri agrikulturo kaj preparis diplomon ebligantan al li realigi sian
revon.

Por kia rezulto ? Mi starigis la demandon kaj la respondo estas : la kutimaj malfacilaĵoj de la senmona

studento, provizoraj laboroj ĉi tie aŭ tie por pagi siajn studojn, ĉambro de servistino ĉe maljuna sinjorino. Feliĉe ŝiaj gepatroj estis tie por doni helpon de tempo al tempo, alie... !
Kaj ĉe la fino de liaj studoj, du jarojn poste, ilia geedzidĝo malsukcesis, sen la ĉeesto de liaj pliaĝuloj, la akiro je kredito de la provenca farmdomo, de la unua paro de kaproj...
Aha ! Ĝojajn kriojn ili estis eligantaj, kiam ili alvenis la unuan fojon en sian ruinigitan kaj ruinigan paradizon. Nenio ŝajnis tro bona por ili.
Ŝi rapide seniluziiĝis, kredis mi !
Kaj en ĉio tio, kio fariĝis el amo ? Pli bone ne pensi pri tio.

Francine subite havis rideton, kiu lumigis ŝian vizaĝon. Ŝi baldaŭ rekuniĝos kun sia tenera amanto. En sia kurso pri kontotenado.
Jam de ses monatoj ili interrilatas. Ŝi renkontis lin en la sama instrucentro por plenkreskuloj, en Alès.. Ŝia stulta edzo estas tiu, kiu enskribis ŝin.
Ŝi rigardis la horon sur la kuireja horloĝo : dekkvina kaj duono.
-- Mi devos foriri. Mi ne devas malfrui al la kurso !
La kurso ? Kia ŝerco ! Ŝi zapos ĝin kiel kutime. De iom da tempo la du geamantoj renkontiĝas unufoje semajne en malgranda hotelo de la urbo.
Tualetoj, la beleta robo freŝdate gladita antaŭtage kaj por esti ankoraŭ pli dezirinda, ŝi haltos survoje por ŝminki sin per la ilujo, kiun ŝi kaŝis en sekura loko.
Antaŭ ol reveni ne forgesi malŝminki sin en la hotelo, alie tio povus ekdanĝeri al ŝi.
Sub la duŝilo Francine ridetis, feliĉa.

La kaprobredisto ankoraŭ kuŝis sur sia lito. Liaj okuloj estis larĝe malfermitaj kaj li atendis, ke Francine foriru por rekuniĝi kun li.
Estas Emilien, la fiŝista kuzo, kiu informis lin pri la perfido, surprizante la paron forlasantan la hotelon iun vesperon.
Jean-Marc ne pensis, ke tia afero povus okazi al li. Tio estis simple nepensebla. Sed li estis preta fari ion ajn por rekonkeri sian Francine kaj pardoni ŝin pri ŝia malfideleco. Li irus atendi ŝin ĉe la pordo de la hotelo, surprizus ilin ambaŭ, por timigi ilin. Eble li eĉ batus la alian ulon, la malamikon. Ĉio eblis. Kaj tiam li batalus, li batalus, per ungoj kaj dentoj, por rekonkeri la koron de sia amatino. Ĉio denove fariĝus normala. Ŝi revenus. Kiel la Pomponnette de la edzino de la panisto.
Li aŭdis la aŭton forveturi kaj li ekstaris.

Francine haltigis la Clion kekcent metrojn de la fardbieno, eliris el ĝi, kaj reprenis sian ŝminkujon, kiun ŝi estis kaŝinta en plasta sako funde de fosaĵo. Ŝi reenaŭtiĝis kaj komencis surmeti lipruĝon rigardante en la retrospegulo.
Subite ŝi vidis la bubaloŝirmilon de la granda kvarpelrada veturilo de sia edzo, kiu alvenis malantaŭ ŝi. Trafite per paniko, ŝi maltenis la ruĝbastonon kaj rapide startis.
Furioza pro tio, ke li vidis ŝin ŝminki sin, Jean-Marc hupis kaj tuŝsekvis ŝin., devigante la junan virinon akceliĝi.

Francine alvenis multe tro rapide al la vojkurbiĝo super la ravino. La Clio flankenglitis sur la gruzo, danĝere alproksimiĝante al la profundegaĵo. La antaŭa rado perdis kontakton kun la firma grundo kaj la veturilo renversiĝis flanken, tamen restante en malstabila ekvilibro super la malpleno. Frenezate, hurlante, la juna virino provis eskapi el tiu kaptilo tra la pasaĝerpordo.
Tamen, ebria pro ĵaluzo, la bredisto, kiu haltis kelkajn metrojn for, forgesis ĉian rezolucion, ĉian provon de pardono, kaj kun trajtoj misformitaj de rabio, de kolero, li trakluĉis la unuan rapidumon kaj puŝis la veturilon en la abismon.
Sen aŭdi la terurajn kriojn de la malfeliĉulino

La Clio malsupren rapidis laŭ la kruta deklivo kaj enprofundiĝis tridek metrojn pli malsupre en la densejojn. Subita halto kontraŭ roko, perforta, terura skuo, korpo ĵetita antaŭen kun la rapideco de kuglo, ventoŝirmilo, kiu eksplodas, krakado de ŝiritaj metalaj folioj, ostoj, kiuj rompiĝas, ferpecoj eltiritaj, akraj kiel raziloj, kiuj penetras en la karnon kiel ponardoj, la feraĵo, kiu tordiĝas, dispremante per sia konfuza maso la korpon de la jam senviva stirantino.
Francine ne havis tempon por suferi, ŝi estis tuj mortigita.

Malfrue en la vespero, Jean-Marc, kiu revenis al la farmbieno sen doni la plej malgrandan helpon al sia edzino, sed zorginte forigi la spurojn de siaj propraj radoj, vokis la gepatrojn de Francine, diversajn amikojn, la fajrobrigadistojn, la policianojn, la lokan hospitalon. Telefonante multfoje kun sincere alarmita tono, li esprimis sian maltrakvilon pro tio, ke li ne vidis ŝin reveni kaj perfekte ludis la rolon de la ploranta edzo.

Ekde la matena morgaŭo oni faris esplorojn, en kiujn li malvigle partoprenis. Neniu riproĉis al li la mankon de entuziasmo, la kompatindulo estis tiel senespera, ke doloris vidi lin. La aŭskultadoj aldonis nenion sed la priserĉado de la ĉirkaŭaĵo ebligis malkaŝi breĉon en la densejoj funde de la ravino.

Specialiĝintaj unuoj resupreniris la kadavron de la juna virino, sur kiun sinkis Jean-Marc, humiligita. Pro manko de konvinkaj elementoj, nenia suspekto ebligis meti la kulpon sur lin kaj la enketistoj fine konkludis al akcidento.

Absurda akcidento !

Tiun novelon esperantigis Jean-Mary.

Avelaj krakkuketoj.

Ingrediencoj por 6

250 g da senŝeligitaj aveloj,

2 ovoj,

10 cl da dolĉa kremo,

100 g da sukero,

250 g da faruno,

2 tekuleroj da rumo,

1 pinĉpreno da salo.

Ŝaŭmigu la ovoj kun la sukero.

Muelu aŭ haku maldike la avelojn kaj aldonu ilin al la antaŭa preparaĵo, kirlante senĉese.

Aldonu la dolĉan kremon, la rumon kaj, iom post iom, la farunon ; kirlu samtempe por obteni homogenan paston.

El tiu pasto, faru bulon kaj lasu ĝin ripozi dum 2 horoj.

Sur farunita ejo, platigu ĝin kaj distranĉu rondajn pecojn.

Kovru la fornoplaton per sulfatizita papero buterumita.

Demetu sur ĝin la pastajn rondetojn.

Enŝovu en la bakfornon je 120° kaj baku dum ĉirkaŭ 30 minutoj ; kiam la kuketoj oriĝas, eltiru ilin el la forno.

Lasu ilin malvarmiĝi antaŭ ol gustumi ilin.

Tiu recepto estis proponita de Jeannine.